# N I A   V O Ĉ O
## Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **FEBRUARO 2008**


**La pasintan 28-an de januaro MEL celebris sian jaran kunsidon. En aparta folio ni inkludas, por nia membraro, la protokolon de la Ĝenerala Asembleo**

**EKSPOZICIO DE E-LIBROJ**

**Centro Comercial Gran Vía de Hortaleza**
MADRID- Metroo "Mar de Cristal"
11-an de februaro ĝis la 8-an de marto

2008 estas la Internacia Jaro pri Lingvoj, kaj Madrida Esperanto-Liceo, kongrue kun la programo de HEF por la evento, deziras montri esperantan literaturon al la madrida publiko. Ambaŭ aranĝos standon vendredon vespere kaj sabaton kaj dimanĉon ( 2-an de marto) matene (11,00- 14,00) kaj vespere (18,00-21,00)

**¡¡¡NI ATENDAS  VIN!!!**

**DIVERSAJ**

Kelkaj madridaj esperantistoj lernis esperanton pere de la *"BEK-kurso",* la rekta lernometodo kiun kreis Dennis Keefe dum sia restado en Madrido. Nun li verkis libron kun pli ol 2.100 ekzercoj kaj cd-romo por prononcado de la tekstoj. La libro konvenas kaj al memstudanto kaj al instruisto. Vi povas aĉeti ĝin po 10 eŭroj ĉe http://www.bekkurso.info

Nova adreso de la argentina e-kurso http://www.esperanto.org.ar/eae/c/

La grupo Onírica Mecánica prezentis en Madrido sian teatraĵon "E c O"  miksaĵo de teatro, danco kaj muziko. Temas pri civilizacio kiu estingiĝas, kun la teksto en esperanto "sen teritoria lingvo".

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

**14-16 marto IBERIA RENKONTIĜO 2008**
**Benicàssim**
http://www.esperanto.cat/ir2008/
Organizas junaj esperantistoj el ĉiuj iberiaj regionoj.

01-08 marto Mediteranea esperanto-semajno. Saint Raphael, Francio. prezmoni@hotmail.com
03-06 julio.67-a Hispana Kongreso de Esperanto. Cuenca . alejandro.pareja@gmail.com
16-26 julio 93-a Universala Kongreso de Esperanto. Roterdamo (Nederlando)
26 julio- 1 aŭgusto. Internacia Junulara Kongreso (TEJO) Szombathely (Hungario)

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

La Sekretariejo de HEF funkcias en Rodríguez San Pedro 13 lunde vespere (17,00-20,30h), dum aliaj tagoj vi povas faksi aŭ telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es

Kvankam ne estas en la buĝeto 2008, HEF subvencios al HEJS kun 80 eŭroj por partopreni en la IRO-08 okazonta en Benicàssim (Castellón). La celo de la subvencio estas helpi en la vojaĝ-kosto de muzikisto kiu oferos koncerton en la renkontiĝo.

Je dato 8a de januaro 2008 Pedro Garrote prezentis al la estraro de HEF demisian leteron, per kiu li ĉesas en sia funkcio de kasisto/librotenisto.  Laŭ la 19a artikolo de la statuto, nun la Estraro elektu anstataŭanton, ratifotan (aŭ ne) en la sekva ĝenerala kunsido. Sed por tio unue necesas kandidatoj.

La **Hispana Esperanto-Kongreso 2008** okazos en Cuenca ekde 3a ĝis la 6a de julio.
Informo pri aliĝilo, hoteloj kaj provizora programo aperos en la paĝaro de HEF kaj en la venonta "Boletín":  http://www.esperanto-es.net  >  esperanto > kongreso

La kontoj kaj buĝeto prezentitaj de Pedro Garrote estis aprobitaj de la estrarkunveno la 19-an de Januaro. La datumoj aperos en Boletín kaj aprobos/malaprobos la HEF-anaro dum la Eksterordinara Asembleo la 25an de Februaro en Madrido.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Laj konversacia-rondoj kiujn organizas Madrida Esperanto-Liceo okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3-7. Tel. 91 446 80 79.

KURSOJ:

**Vallecas**. Pedro Hernández organizas bazan kurson, sabate je la 17,00-a horo kaj je la 18,30-a meza nivelo. Tel. 91 507 90 84/85 kaj 667 721 951

**Hortaleza**. 11-a februaro-8-a marto. Ekspozicio pri esperantaj libroj. Centro Comercial Gran Vía (Vidu supre)

PRELEGOJ:

18-an de februaro, lundo je la 18,30, projekcio de lumbildoj “Nia Hispanio: Kanariaj Insuloj” Komentas Lupe Sanz, en la sidejo de HEF, Rodríguez San Pedro, 13, 3º.

## La kotizo de MEL por la jaro 2008 estas 12,00 eŭroj

La membroj kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon, povas pagi 12 eŭrojn rekte la lundon en nia konversacia rondo (Rodríguez San Pedro 13-3º-7) aŭ al Esperanto Liceo de Madrid,

Banco Sabadell/Atlántico konto 0081/7110/98/0001266730

**NEKROLOGO**

Dum la lastaj tagoj de Januaro mortis du eminentaj kaj aktivegaj esperantistoj: la sviso Claude Piron kaj la usonano Don Harlow.

Claude Piron verkis multajn artikolojn kaj librojn pri nia lingvo. Inter la plej famaj troviĝas "La bona lingvo" kaj la novelo "Gerda malaperis". Ĉi lasta estas vaste uzata kiel lernolibro de Esperanto pro ĝia lerta uzo de la lingvo tiel ke la teksto estas tre bone komprenebla eĉ fare de komencantoj. Antaŭnelonge en Brazilo oni eldonis filmon, nur laŭ formato DVD, kun tiu sama titolo, bazita sur la verko de Piron. Ni varme rekomendas al niaj legantoj viziti la retpaĝaron de tiu neforgesebla esperantisto, en la adreso: http://claudepiron.free.fr/

Ampleksa interesplena hispanlingva biografio de Claude Piron troveblas en la jena retadreso: http://es.wikipedia.org/wiki/Claude_Piron

Don Harlow amplekse verkis originale kaj traduke en Esperanto. Li estas aŭtoro de grava lernolibro por anglalingvanoj. Krome, li kreis imponan retpaĝaron pri esperanta literaturo, kiun ni ankaŭ varme rekomendas viziti per la adresoj:

http://donh.best.vwh.net/Esperanto/ kaj http://www.webcom.com/donh/don.html

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid

**ACTA Nº 44**

En los locales de la Federación Española de Esperanto, el día 28 de enero de 2007, a las 19,00 horas, en segunda convocatoria, se celebró, previa convocatoria por la Presidenta en el boletín "Nia Voĉo, la Asamblea General Ordinaria de socios de Esperanto Liceo de Madrid, con el siguiente orden del día.

**1.- Informe sobre los socios.**

1.1 SOCIOS EN SITUACIÓN DE ALTA A 31 DICIEMBRE 2007 … 33

Al corriente de pago 22
Con una cuota pendiente 3 Nº 230, 527, 529
Más de una cuota pendiente 4 Nº 431, 445, 450, 518
Socio de honor 4 Nº 1 Gerardo Flores Martín, 29 Augusto Casquero, 187 G.C. Fighiera y 520 HEF

Variaciones en 2007:

| | | |
|---|---|---|
| Altas | 1 | Nº 530 |
| Bajas por falta de pago | 4 | Nº 196.436,476 y 526 |
| Baja voluntaria | 1 | Nº 303 |

**2.- Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea anterior.** Se aprobó el acta nº 43 tal como se publicó en el boletín del mes de febrero de 2007 para comentarios.

**3.- Balance económico 2007.** La secretaria comentó el informe publicado en el nº de enero de 2008 de Nia Voĉo. El saldo a favor del Liceo a 31-12-2007 es: en c/c banco Sabadell/Atlántico 891,87 euros, en depósito a plazo 25.500 euros, en caja 3,74 euros, en cuenta UEA-Rotterdam 71,42 euros; total en tesorería 26.463,03 euros. Pendiente de cobro (libros en depósito en librerías) 406,98 euros. La secretaria comentó que además hay un importante stock de libros para venta destacando el editado en 2005 "El hombre que desafió a Babel" y "Nuevo método de esperanto" editado en 2001. El balance del ejercicio fue aprobado por unanimidad.

**4.- Presupuesto 2008.** El presupuesto previsto para 2008 asciende a 2.000 euros, en el se han incluido 1.000 euros para la adquisición de un armario para la biblioteca de la Asociación que será instalado en la sede de la Federación Española de Esperanto. La compra está condicionada a la obtención de una subvención del Ayuntamiento. La cuota anual de socios de número se mantiene, por décimo cuarto año consecutivo, en 12,00 euros. El presupuesto, publicado en el boletín de diciembre 2007, fue aprobado por unanimidad.

**5.- Actividades desarrolladas en 2007.** Se aprobó por unanimidad la memoria publicada en el número de enero de 2008 del boletín en la que se resumen las actividades llevadas a cabo durante el pasado año.

**6.- Programa para 2008.** El programa de actividades, publicado en el boletín Nia Voĉo de diciembre 2007, continúa en la línea de difundir, propagar y facilitar la práctica del esperanto a quienes lo deseen, así como fomentar las actividades lúdico culturales entre socios. Se indicó que se

continuará en la línea de ayuda y apoyo a la Federación Española de Esperanto. El programa presentado fue aprobado por los presentes.

El boletín "Nia Voĉo" que desde 1985 redacta Lupe Sanz Bueno, continuará siendo redactado por ella, con colaboración de Darío Rodríguez y Manuel Parra.

**7.- Ruegos y preguntas**

La Secretaria recuerda a los socios que el mandato de la actual Directiva termina el próximo año y que es aconsejable que otros socios accedan a los puestos para introducir ideas nuevas.

Al no haber ningún otro asunto que tratar la Presidenta dió por terminada la Asamblea General a las 20,30 h**.**

## **Junta Directiva** (2005-2009)

| | |
|---|---|
| Presidenta: | Carmen Suárez Fernández-Cid |
| Secretaria: | Guadalupe Sanz Bueno |
| Tesorero: | José Francisco Platas |
| Vocal 1: | Angelita Sanz Mayor |
| Vocal 2: | Jaime Vinielles de Pereda |

**1.1.1 El original, en el correspondiente Libro de Actas, lleva la firma de la Secretaria**

**1.1.2 y el Vº Bº de la Presidenta**

ESTE ACTA SE PUBLICA EN “Nia Voĉo” PARA COMENTARIOS QUE SERÁN RECIBIDOS HASTA EL 28 DE FEBRERO